

MIRMEKOB0 13



JUNIO 2011

MIRMEKOBO 13

Junio 2011

Redaktoro: Donald Broadribb

Retejo de Mirmekobo:

<http://web.me.com/donbroadribb1/>

La foto sur paĝo 1 montras testudon el la Galapagoj, loĝanta en la Zoologiaj Ĝardenoj de Perto, en Aŭstralio. Brikfabrika kompanio donacis du tunojn da speciala argilo preparita laŭ la konsisto de la natura argilo galapaga, por doni al la testudo hejman senton.

Tabelo de Enhavo

rakonto	Sonĝo kaj realo (de Júlia 'Sigmond).....	3
bildo	Kakto kun floro (kun abelo).....	6
ortografio	La apostrofo (de Júlia 'Sigmond).....	7
sociaĵoj	Kiom valoras aŭtografioj? (de Roberto Pigro).....	8
legendo	Orfeo kaj Eridico (rerakontas Siv Burell).....	9
pripenso	Sidi ĉe la fenestro (de Alexandre Garcia; tr. Josenilton kaj Madragoa).....	10
anonco	Dumonata <i>Mirmekobo!</i>	11
arkeologio	Brakumitaj sep mil jarojn kaj duonon de (Gane Đorđević; tr. Mirić Jadranka).....	12
bildo	Spiralaj galaksioj koliziantaj (NASA).....	13
sento sveda	Aŭtuno (de Kerstin Rhodin).....	14
rakonto	La formo (de Istvan Ertl).....	16
arkeologio	La metodo de konstruado de la Al Jizah-piramidoj ne plu estas mistero (de Henry Broadbent).....	17
rakonto	Eta ŝtelisto (de Mara Vučelić; tr. Bojana Alfirević).....	24
poezio	Artistoj inter si (de Anneke Schouten-Buys).....	26
geografio	Resumo de la esplorado rilate al Aŭstralio (de Terry Manley).....	27
humuraĵo	(de Siv Burell).....	30
recenzo	<i>Nomoj kaj sortoj</i> de Júlia 'Sigmond (rec. Donald Broadribb).....	31

**Numero 14 de Mirmekobo
aperos en aŭgusto 2011**

rakonto

SONĜO KAJ REALO

de Júlia 'Sigmund (Italio)

Strangajn sonĝojn havas foje la homoj.

Pasint-nokte ankaŭ mi havis vere interesajn sonĝojn. En mia sonĝo mia edzo havis novan domon. Ĝi estis grandega kaj belega, konstruita en la mezo de mirinda ĝardeno. Mi vizitis ĉiujn ejojn. Fine, teretaĝe mi eniris en iun grandan ejon. Mirigite mi konstatis, ke ĝi estas grandega baseno. La akvo estis brilante pura. Post mallonga hezitado mi eniris en la akvon — tiel vestite kiel mi estis, kaj mi ekenaĝis. En tiu minuto enpaŝis la filino de mia edzo. Sen saluto, sen iu ajn vorto, ankaŭ ŝi plaŭdiĝis en la akvon, same en strata vestaĵo, kaj ankaŭ ŝi ekenaĝis. Longe ni naĝis, tute mute, en la bela naĝbaseno....Mi kuris sur vojo, ne tro rapide, nek malrapide. La pejzaĝo estis bela, sed nekonata en realo. Tamen, ĝi iom similis al la ĉirkaŭaĵo de la domo de mia edzo. Strange estis, ke ĉio estis bruna kaj avelkolora, kia estis nia anonckarto pri geedziĝo en la realo. Kaj la arboj kaj la herbaj kampoj. Domon mi ne vidis, nek vivantaj estaĵoj montriĝis. Longtempe mi kuris, tamen mi ne laciĝis. Subite mi rimarkis, ke mi estas tute nuda! Tiam mi ekmemoris, ke mi kapablas per la forto de la penso materialigi, aperigi, realigi ion ajn. Mi pensis, ke mi bezonas iun veston, ke mi ne kuru nude. Post iom da tempo mia tuta korpo estis envolvita en neĝoblanka litotuko. Mi kontente kuris pluen, nek pli rapide, nek malakcelante la ritmon. Mi kuris, kuris, kuris. En la malproksimo mi ekvidis vilaĝan dometon. Ankaŭ ĝiaj koloroj estis diversaj nuancoj de la bruno, de la plej hela ĝis la plej malhela. Mi alproksimiĝis al la dometo. Ĝi estis tre silenta. Mi eĉ ekpensis, eble neniu loĝas en ĝi? Tamen, bonedukite mi frapis la pordon kaj enpaŝis. Mezaĝa virino staris apud la tablo, antaŭ treege eta fenestro. Ŝi knedis panon aŭ kukon, mi ne bone vidis kion ŝi estis prilaboranta, ĉar en la eta ejo estis nur duonlumo. Vidalvide al la pordo staris juna, bela knabino. Ŝi akceptis mian saluton kaj ridetante resalutis min. La laboranta virino silentis. Ili rigardis al mi iomete mirigite, ja mia sola vestaĵo estis la blanka litotuko, sed ili ne diris nek pridemandis min, kio okazis al mi? En mia dekstra mano mi havis unu 100-valoran monbileton. Mi demandis ilin, ĉu ili povas vendi al mi iun ajn vestaĵon. La junulino komplezeme proponis iun tute novan robon, ĵus aĉetitan kaj ankoraŭ neniam uzitan de ŝi. Mi transdonis la monbileton, sed ŝi ne volis akcepti ĝin, ja la robo eble nur dekonan valoron havas. Mi trankviligis ŝin, ke por mi la robo valoras multe pli ol ĝia vera prezo. Ŝi donis al mi la belegan robon. Ĝi estis nigra, kun etaj blankaj ŝprucmakuloj. Ĉirkaŭ la kolo estis bela blanka kolumo puntaĵ-ornamita. Kaj ĝi estis perfekte bona, fakte taŭga por

miaj mezuroj. Ŝanĝante mian blankan “litotuk-vestaĵon” por tiu belega, eleganta robo, mi esprimis mian sinceran dankon al la ridetanta junulino, kaj kontente mi foriris.

Malantaŭ la dometo la pejzaĝo jam ŝanĝiĝis. Ĉio estis kolora. La verdaj kampoj kaj la verdaj arboj rande de la vojo gajigis min. Mi vidis ankaŭ multajn aliajn domojn kun vigle ruĝaj tegmentoj. Sur la strato mi vidis multajn rapidiĝantajn homojn, kiuj iris samdirekten ale al granda konstruaĵo. Mi ekiris kaj mi ne retrorigardis! Mi atingis tiun pluretaĝan domegon kaj supreniris la ŝtuparon. Dekstre la unua pordo estis malfermita. Mi haltis antaŭ la pordo kaj enrigardetis. La salonego estis plenŝtopite plena. Vidalvide al la pordo, en la fono de la ejo, sidis apud longa tablo multaj konataj, gravaj esperantistoj. Unu el ili estis Zlatko Tišljar, li parolis tre laŭte kaj pasie, en perfekta Esperanto, pri la nuntempa ĉefa problemo: enkonduki Esperanton en Eŭropa Unio. Tre interesis min la temo, kaj mi volis resti por aŭskulti ankaŭ la aliajn parolantojn, sed en la salonego ne tro estis liberaj lokoj. Tiam, ĝuste antaŭ mi, mia amikino Mladenka Daković sidanta en la lasta vico rimarkis min. Kun ĝojo ŝi invitis, ke mi eksidu, ĉar apud ŝi estas sufiĉa loko ankaŭ por mi. Ni interkisis, ĉirkaŭbrakumis unu la alian, ĝojante pro la renkontiĝo. Mi eksidis kaj aŭskultis la plej gravajn-lertajn esperantistojn pri nia nuntempa plej grava problemo. Multaj el ili parolis libere aŭ prelegis de surpapere pri la konferenca temo, pri la gravaj eblecoj povantaj solvi nian problemon. La kunsido estis vere interesa kaj valora. Kun granda intereso mi aŭskultis, pensante pri tio, kiujn novajn taskojn mi havos ekde nun. La estimindaj gvidantoj de la konferenco estis vere bravaj kaj la paroladoj vere konvinkaj. La kunsido daŭris longe, longe....Mia frato verkis novan romanon. Li volis viziti sur monto vivantan viron, kiu estis la ĉefheroo de la romano. Li petis min, ke mi akompanu lin. Mi estis scianta kaj konanta lian sekretan planon: li deziris, ke mi ekkonu tiun viron, ĉar kiu scias...?! Nu, mi iris kun li.

Sur la montopinto troviĝis la domo de tiu montloĝanto. La domo estis ege modesta. La viro — mezaĝa, kun tre serioza, ne ridetanta mieno, asketaspekta, tamen tre simpatia — sidis apud simpla ligna tablo kaj legadis ion, kiam ni enpaŝis. Ni manpremis. Li sidigis nin ĉirkaŭ la tablon. Mia frato kaj li ekkonversaciis. Dume mi havis tempon kaj eblecon iomete ĉirkaŭrigardi en la ejo. Tre simplaj kaj malmultaj mebloj, nek floroj, nek pentraĵoj aŭ bildoj, sed kelkaj bretoj staris apud la muro kun multaj libroj. Li proponis, ke ni ekrigardu la montaron malantaŭ lia domo. Mi ne atentis pri kio ili diskutis, sed ŝajne mia frato estis kontenta pri la interparolado. Ni do nin preparis eliri de la domo — ĉu vere nur unuĉambra? — por vidi la promesitan belegan montaron. En tiu momento enpaŝis mia eksa klaskolegino Judit kun sia edzo. Ili estis treege elegante vestitaj, en nigra kaj blanka vestaĵoj. Mi miris kaj ne komprenis, kial

oni devas vestiĝi en “dimanĉa” robo por viziti montloĝantan amikon?! Ni anoncis ilin, ke ni tuj iros ekrigardi la montojn malantaŭ la domo, kaj invitis ankaŭ ilin. Nu, jam komenciĝis la krepusko kaj mia ekskolegino diris, ke ŝi timas en tiu mallumo iri sur ĉi tiu obskura vojo. Pli bone ili revenos aliokaze viziti lin. Kaj adiaŭante ili foriris. Ni admiris la montojn! Ili estis preskaŭ tiel belaj, se ne eĉ pli belaj, ol Hafelekar en Aŭstrio, monton kiun mi neniam povos forgesi pro ĝia nekomparebla beleco!

Ni reiris al la domo. Alvenis aliaj novaj gastoj. La montloĝanto ne estis surprizita. Du virinoj enpaŝis la ĉambron. La mezaĝa tuj eksidis sur la centran seĝon kaj ekparolis. La pli juna, blondeta, tute hejmece iris al la bretoj, ion prenis de tie kaj metis aliloken. Mi eksentis malvarmon en mia koro: vane mi alvenis. La sekreta plano de mia frato ne povos realiĝi. Tiu mezaĝulino ne lasos la montloĝantan viron el siaj ungegoj, por akapari edzon por la blonda junulino. Mia frato sidis flanke apud la muro, jam tute silente, ĉar la mezaĝulino konstante, sen paŭzo parolis. Ŝi diris neniaĵojn. Neniun ŝi lasis kromparoli. La blondulino iris tien kaj reen en la ejo, eĉ sencele, preskaŭ volante montri, ke ĉi tie ŝi estas hejme....En iu tre malnova domo ni estis jam en la lito kun mia edzo. Alvenis gastoj (en realo nekonataj personoj.) Ni tute ne ĝeniĝis, ke ni jam enlitiĝis kaj plu restis en la lito. La gastoj sidiĝis kaj ni ekdiskutis. Post iom da tempo ekmirante mi rimarkis, ke mia edzo fakte estas mia Dolĉapatro. Estis nekredeble! Sed poste mi rimarkis, ke fakte ankaŭ mi ne estas mi, sed mia Dolĉapatrino! Mia edzo kaj mi, ni diskutis kun niaj gastoj, sed tamen, niaj korpoj estis la korpoj de miaj Gepatroj.

...La 18-a de januaro estas aparte bela, grava tago en nia vivo. Ĝuste antaŭ kvar jaroj skribis al mi la Unuan Leteron mia edzo.¹ Li legis iun mian novelon en iu gazeto, kaj ĝi tiel forte impresis lin, ke tuj li ekhavigis mian adreson, por skribi al mi, ke li tiel sentas: ni estas fratanimoj! Ekde tiam ni korespondis. Jam pli ol mil leterojn ni skribis unu al la alia. Okaze de tiu bela datreveno ni elprenis la malnovajn leterojn. Kun ĝuo ni legis la Unuan! Poste ankoraŭ kelkajn el la “heroa erao” de nia amhistorio. Vera vivromano kaŝiĝas en tiuj plurcent leteroj. Ni rememoris pri nia unua persona renkontiĝo kaj pri ĉiuj aliaj kunestoj, kunvojaĝoj. Kiel transformiĝis nia sincera amikeco al profunda amo, pli bone ekkonante unu la alian. Ni rememoris nian longan, longdaŭran luktadon kontraŭ la sensenca burokratio, kiu montriĝis preskaŭ malamika kontraŭ nia decido geedziĝi.

Ni apartenas al du nacioj kaj loĝas tre malproksime. Fakte 1200 km. estas aerlinie la distanco inter niaj du urboj. Per la aviadilo ni povas vojaĝi kvazaŭ per fe-flugiloj kaj malpli ol du horojn necesas vojaĝi por esti denove kune. Sed ne tiu tekniko estas la plej mirinda en la tuta historio. La miraklo, kio okazis al ni du, estas dankinda sol-sole al Esperanto. Sen tiu mirinda lingvo neniam ni

povintus konatiĝi, renkontiĝi, interamikiĝi, enamiĝi! Ofte ni parolas pri la vere genia kreinto de ĉi tiu mirinda Internacia Lingvo. Antaŭ 150 jaroj naskiĝis tiu geniulo kaj jen, nun, post tiom da tempo, du matusalem-aĝaj esperantistoj benas la memoron de Zamenhof, al kiu ili povas danki la nekredeblan feliĉon. Ĉar vere estas reala, natura kaj malfalsa — eĉ se ĝi estas nekredebla — tiu sento, kiu nomiĝas AMO. Nenio gravas, nenio sencas, krom unu sola afero: ni aŭdacas esti feliĉaj! Malgraŭ la teruraj dudekunjarcentaj mondproblemoj, malgraŭ la nin ĉirkaŭanta tutmonda mizero, envio, monavido kaj pli kaj pli fremdiĝanta terloĝantaro. Nia amo estas certa, forta kaj neŝancelebla. Ĉi tiu nia sento kaj mirakla renkontiĝo forte impresas kaj eĉ feliĉigas ĉiujn niajn geamikojn — egalmezure ĉiujn — sed precipe la esperantistojn, ĉar nia historio similas al fe-fabeloj, kie ĉio eblas, eĉ la reale neebla! Sed ververe, se ni pensas, ke nuntempe pli ol ses miliardoj da homoj vivas sur nia terglobo, kion ni povus respondi al la tikla demando: kaj kiom el ili estas feliĉaj???

¹ Júlia 'Sigmond estas la edzino de Sen Rodin; ambaŭ estas tre sukcesaj verkistoj. Pri ilia geedziĝo, vidu *Mirmekobon* 8 p.13. Pri la mistera ' en la nomo 'Sigmond, vidu la ĉisekvan artikolon.—Red.



Kakto kun floro (kaj abelo), en la ĝardeno de via redaktoro

ortografio

LA APOSTROFO

de Júlia 'Sigmund

Dum mia tuta vivo mi havis problemon kun la apostrofo. Ne temas pri tiu zamenhofa, kiun facile mi alproprigis, kiam mi eklernis la Lingvon Internacian, sed pri tiu, per kiu komenciĝas mia familia nomo: 'Sigmund.

Laŭ la malnova hungara gramatiko en la familiaj nomoj, kiuj komenciĝis per la duobla litero “ZS” (j), la literon “Z” oni anstataŭigis per la apostrofo (').

Fakte, mia familia nomo estas Zsigmond (jigmond), sed estas ne nur skribata kun apostrofo 'Sigmund (jigmond), — laŭ la malnova hungara gramatiko — , sed ĝi estas ankaŭ prononcata Zsigmond (jigmond).

Iam, ĉirkaŭ je la fino de la dekoka jarcento, oni komencis skribi la familiajn nomojn komenciĝantajn kun la litero “ZS” per la litero “S”, uzante la apostrofon anstataŭ la literon “Z”, kiel ekzemple ĉe la malnovaj hungaraj nomoj 'Sakò (jako), 'Sibò (jibo), 'Sigmund (jigmond), 'Sigray (jigrai) k.a.

Krome estas kelkaj malnovaj hungaraj familiaj nomoj, kiel ekzemple “Dòsa” (doŝa), “Jòsika” (joŝika), kie la nomo estas skribata per litero “s” (ŝ), sed ĉiam oni prononcas ĝin “zs” (j), nome “Doĵa” aŭ “Joĵika”.

Mia urbo “Kolozsvar” (koloĵvar), — rumanne “Cluj” (kluj), germane “Klausenburg” (klauzenburg), — antaŭ jarcento same estis skribita “Kolo'svar” (koloĵvar). En la plej malnovaj tempoj ĝi havis diversajn nomformojn, kiel “Clus”, “Clws”, “Culus”, “Colus”, “Kulus”, “Kolus”, “Cluswar”, “Kuluswar”, “Koloswar”, “Kolosvar”, sed tamen, la litero “s” (ŝ) ĉiam estis prononcita “j”.

Nuntempe, oficiale mia nomo estas skribata Sigmund. Novaj rumanaj konat(in)oj prononcas mian nomon “Sigmund”, la hungaroj prononcas “Ŝigmund”. Mi tuj korektas ilin kaj diras, ke mia nomo estas nek Sigmund nek Ŝigmund, sed oni prononcas “jigmond”, kaj sekvas la rakonto pri la historio de la jarcentaj hungaraj-sikulaĵaj nomoj kaj apostrofoj.

Oficiale do, en ĉiuj miaj dokumentoj, mi estas Sigmund, sed en mia privata vivo mi ĉiam uzas la — oficiale nun ne uzeblan — hereditan, karan, malnovan familian nomon.



Júlia 'Sigmund

sociaĵoj

KIOM VALORAS AŬTOGRAFOJ?

de Roberto Pigo (Italio)

Kiu estas la diferenco inter subskribo kaj aŭtografo?

Teknike neniu, oni dirus. Ambaŭokaze temas pri nomo propramane skribita, kiu nuntempe reduktiĝas pli kaj pli ofte al strekfuŝaĵo senspripense realigita. Malsamaj tamen el “malteknika” vidpunkto ne mankas kaj ĉirilate oni legu anekdoton el mia adoleska aĝo: la itala futbalteamo Parma, por kiu siatempe mi zelotis, estis veninta al mia urbo por maĉo kontraŭ Udinese, la loka klubo. La tagon de la maĉo, en la centro nekredeble renkontis mi surstrate la (ankoraŭ ne tutmonde konatan) futbaliston Fabion Cannavaron. Li promenis kun siaj kunuloj, kaj — kun knaba emocio — mi alproksimiĝis al li por peti aŭtografon. Ve al mi! Li parolis tiumomente per poŝtelefono (tiam rezervata al gravuloj) kaj snobe flankenpuŝis min. Tiel mi komprenis, ke ies subskriboj estas treege pli altvaloraj ol la efektive konsumita inko. Sed ek tiam mi ankaŭ ĉesigis kolekti aŭtografajn, rigardante ilin (ĝis nun) kiel nurajn makulojn tute similajn al mia subskribo aŭ al tiu, tremanta, de mia avino (karmemora).

Ne devas interkonsenti kun mi la (multaj) uloj, kiuj daŭrigas ĉiamaniere havigi al si kaj ofte aĉeti je kapturnaj prezoj iun ajn aŭtografon. Ili certe ĝojas pro la freŝa apero, en Italio, de eldonaĵo (Autografi italiani dal 1800 al 2000, Edizioni Unificato), en kiu estas reproduktitaj pli ol mil aŭtografaj subskriboj de personoj, kiuj ial transiris en la landan historion. En la sama libro aperas krome la takso pri 2500 aŭtografoj de samnombraj “protagonistoj de historio, kulturo, arto kaj sporto”, kiel legeblas en la subtitolo. Temas ŝajne pri vera novaĵo en la eldona universo, konsultinda de kiuj — ree senpolviginte malnovan diskon aŭ libron kun amema (ĉu sincera?) dediĉo de ĝia aŭtoro aŭ malvolvinte la embarasan dekretan, per kiu la propra praavo (karmemora ankaŭ li!) estis dekoraciita post la milito — deklaras sin certaj posedi etan inkan trezoron.

Nu, ne mankas surprizoj, se veras, ke la subskriboj de Garibaldi kaj Mazzini — herooj de la nacia renaskiĝo kaj unuiĝo de Italio — valoras multe pli ol tiuj de Cavour kaj Viktoro Emanuelo la 2a, respektive la unua ĉefministro kaj la unua reĝo de la unuigita lando. Pli multe da skribaĵoj lasis fakte ĉi-lastaj. Kelkfoje ludas grandan rolon la dato de la subskribo, kio validas ankaŭ okaze de moneroj: la subskribo de Giovanni Maria Ferretti valoras 300-400 eŭrojn en la jaroj dum kiuj li kardinalis, ascendante al 700-800 apenaŭ li iĝis papo (kun la nomo Pio la 9a) kaj al 2000, okaze de leteroj kun interesa enhavo.

Ankaŭ por papo Paŭlo la 6a (civile Giovanni Battista Montini), la taksoj varias: antaŭ la papregado, subskribo lia ne valoras pli ol 200 eŭrojn, sed inter 1963 kaj 1978 ĝi fiksiĝas je 400 eŭroj kaj, en iuj leteroj, ĝi atingas eĉ 1000.

La nomoj de la taksitaj gravuloj aperas laŭ alfabeto ordo, kun mallonga biografio. Se oni havis plurajn subskribojn, ĉiuj aperas. La libro, kiun oni povas konsideri interesa donacideo, aĉeteblas ĉe italaj vendejoj pri filatelio kaj numismatiko aŭ pere de la eldoneja retpaĝo www.unificato.it.

Koncerne al Fabio Cannavaro, kvantigi, kiom ekzakte mi perdis la tagon de lia “Rezigno Grandă”, ne eblas, ĉar la libro konsideras nur personojn ne plu vivantajn, kaj li ankoraŭ junas. Se vi tamen hazarde renkontos lin, teniĝu longdistance: ekde kiam — en 2006 — li fariĝis kaj mondĉampiono kaj eŭropa futbalisto de la jaro, li verŝajne komencis eĉ draŝi la misŝanculojn, kiuj nure promenas proksime de li, en malpli ol duonmetra radiuso.

legendo

ORFEO KAJ ERIDICO

rerakontas Siv Burell (Svedio)

En la lando Trakio iam loĝis lerta kantisto nomata Orfeo. Lia patro, kiu estis la dio Apolono mem, donis al li liron kaj instruis al li kiel oni ludas ĝin. Do ne estas strange ke la muziko de la juna viro estis tre bela. Orfeo fakte tiel plaĉe ludis, ke kiam li tuŝis la kordojn, la bestoj kaj birdoj kuniĝis en rondon ĉirkaŭ li por aŭskulti lian ludadon.

Orfeo kaj la nimfo Eridico amis unu la alian. Ili geedziĝis kaj vivis feliĉe dum longa tempo. Sed la paŝtisto Aristaios ankaŭ sopiregis ŝin. Foje li ekvidis Eridicon en la arbaro, kaj kuregis al ŝi. Ŝi fuĝis kaj sukcesis sin forsavi de li.

Sed ŝi fariĝis tre laca kaj kuŝiĝis sur la teron. Ŝi ne rimarkis la serpenton ĉe ŝia piedo. La serpento ekmordis. Estis ege venena serpento kaj post kelkaj minutoj Eridico mortiĝis.

Orfeo atendis longatempe, fariĝis maltrankvila kaj sendis siajn servistojn serĉi ŝin. Finfine ili trovis ŝin kaj portis ŝin al Orfeo. Li fariĝis nekonsolebla.

Li decidis elporti ŝin el la Subtera Mondo. Orfeo iris al la Subtera Mondo kun sia liro. La regantoj de la Subtera Mondo nomiĝis Hadeso kaj Persefono. Ili estis tuŝitaj de la sonoj de la liro, kaj promesis redoni Eridicon al li. Sed ili metis kondiĉon. Li ne rajtis turni sin kaj rigardi Eridicon dum la promeno tra la tunelo supren al la tero.

Eridico sekvis lin, kaj ili proksimiĝis la surfacon de la tero. Tiam ŝajnis al Orfeo ke li ne plu aŭdis la paŝojn de Eridico. Li turnis sin kaj provis tuŝi la manon de Eridico. Sed li ne atingis ĝin. Eridico rapide malaperis reen en la Subteran Mondon — por ĉiam!

pripenso

SIDI ĈE LA FENESTRO

Alexandre Garcia (ĵurnalisto de la brazila *GloboNews*)
(tradukis: Josenilton kaj Madragoa)

Mi estis infano, kiam mi unuafoje eniris aviadilon. La emocio flugi estis grandega.

Mi nepre volis sidi ĉe la fenestro, ĝui la flugon ekde ĝia unua momento kaj senti la aviadilon kurentan sur la trako pli kaj pli rapide, ĝis ĝi deteriĝis.

Rigardante tra la fenestro, kortuŝite mi vidis la aviadilon trapasi la nubojn, atingante la bluan ĉielon. Ĉio estis novaĵo kaj fantazio.

Mi plenkreskis, diplomiĝis kaj eklaboris. En mia ofico, ekde la komenco, flugi estis konstanta neceso.

De tempo al tempo, malproksimaj kunvenoj kaj urĝaj taskoj devigis min iri al du urboj en unu sama tago.

Komence, mi ĉiam mendis sidlokon apud la fenestro, kaj, kun la infanaj okuloj, mi admiris la nubojn, ĝuis la vojaĝon, kaj eĉ ne ĝenis min atendi iom pli por eliri el la aviadilo, preni la bagaĝon ktp.

La tempo pasis, la metia vivo pliintensigis, kaj mi ne plu nepre volis sidi ĉe la fenestro nek vidi la nubojn, la sunon, la urbojn malsuprajn, la maron aŭ ian ajn eksteran pejzaĝon. Mi perdis la entuziasmon. Mi volis nur eniri kaj eliri, sidi rapide kaj eliri rapide. Nun, la sidlokoj ĉe la koridoro estis postulo. Ili faciligis la eliron sen bezono atendi iun ajn. Mi estis ĉiam zorgema pri la horo, pri la tasko, pri ĉio, escepte de pri la vojaĝo, la pejzaĝo, mi mem.

Dum unu hazardo de la destino, en pluvplena vespero, mi volegis reveni de San Paŭlo, bezonante alveni al Kuritibo plej eble urĝe.

La aerŝipo estis plenplena kaj la sola libera sidloko estis ĉe fenestro, en la lasta seĝvico. Sen hezito, mi akceptis tuje, prenis la flugbileton kaj enveturiĝis.

Mi eniris en la veturilon kaj sidis sur la indikitan lokon, ĉe la fenestro, fenestro kiun mi delonge ne atentis, aŭ, pli ĝuste, tra kiu mi jam ne interesigis rigardi.

Subite, kiam la aviadilo deteriĝis, mi ekrememoris la unuan fojon kiam mi flugis. Mi sentis denove kaj strangumis tiu sopiro, tiu malvarmo en la ventro. Mi admiris la aviadilon flugantan tra la malhelaj nuboj, ĝis, post la pluvo, aperis la ĉielo. Ĝi havis bluan tiel belan kiel mi neniam vidis antaŭe. Ankaŭ la suno, kiu brilis kvazaŭ ĝi estus ĵus naskiĝinta.

En tiu momento, kiam mi fariĝis denove infano, mi eltrovis, ke mi forgesis iom vivi dum ĉiu vojaĝo en kiu mi neglektis tiun pejzaĝon.

Mi ekpensis la jenon: ĉu mi ne lasis ankaŭ sidi ĉe la fenestro rilate al la aliaj

aferoj en mia vivo, kiel ekzemple, rigardi tra la fenestro de miaj amikecoj, de mia geedza vivo, de mia laboro kaj persona kunvivado?

Mi kredas, ke iom post iom, ne perceptante, ni lasas rigardi tra la fenestro de nia vivo.

Ankaŭ la vivo estas vojaĝo, kaj se ni ne sidas ĉe la fenestro, ni perdas tion, kio estas plej bona: la pejzaĝojn, kiuj estas niaj amoj, ĝojoj, malĝojoj kaj fine ĉio kio konservas nin vivantaj.

Se ni vojaĝos nur sur koridora seĝo, rapideme por alveni ien ajn, ni perdos la oportunion rigardi la belaĵojn, kiujn la vojaĝo proponas.

Se ankaŭ vi estas en akcela ritmo, ĉiam mendante koridoran seĝon por eniri kaj eliri rapide kaj tiel gajni tempon, haltu iomete kaj pripensu kien vi volas alveni.

La aeroplano de nia ekzistado flugas rapidege kaj la daŭro de la vojaĝo ne estas anoncita de la piloto. Ni ne scias kiom da tempo ankoraŭ restas al ni. Pro tio, valoras la peno sidi ĉe la fenestro por ne preteratenti ian ajn detalon.

En la fino de la finoj, la feliĉeco kaj la paco estas vojoj, ne destinoj.

anonco

Dumonata Mirmekobo!


Ĝis nun *Mirmekobo* aperadis ĉiun trian monaton, t.e. kvarfoje en la jaro.

Ekde nun, mi planas aperigi *Mirmekobon* ĉiun duan monaton, t.e. sesfoje en la jaro.

Mirmekobo restas tute senpage abonebla, kaj oni rajtas presi ekzemplero(j)n por si mem kaj/aŭ por aliaj personoj sen peti permeson de la eldonanto.

Eldonas *Mirmekobon* mi mem, via redaktoro. Du personoj antaŭprovlegas ĉiun numeron por helpi elsarki komposterarojn. Mi elektas la enhavon, aranĝas, kompostas kaj dissendas ĝin per Interreto. La paĝformato estas A5. La komputilo uzata estas Macintosh iMac, kaj la programo uzata por la kompostado estas Mellel. Bildoj estas ankaŭ prilaborataj per la programoj Graphic Converter kaj Photoshop. Enhavon por *Mirmekobo* rajtas kontribui kiu ajn persono. Detalojn pri la karaktero kaj temoj de kontribuajtoj vi povas trovi sur la lasta paĝo de ĉi tiu numero.

Mi ne povas antaŭpromesi aperigon de artikolo/bildo en specifa numero de *Mirmekobo*, sed ĉiu akceptita verkaĵo ja aperos en iu numero de *Mirmekobo*.



arkeologio

BRAKUMITAJ SEP MIL JAROJN KAJ DUONON

Raporto de Gane Đorđević

(ALO-gazeto, la 22an de Januaro 2011).

Tradukis Mirić Jadranka

Universitato Oxford (Anglujo) asertis ke en la vilaĝo Mali Borak apud urbeto Lajkovac (Serbio) estis malkovritaj du tomboj ene de tombo, kun tute bone konservitaj skeletoj de ino kaj de infano.

Ili estis oldaj sep mil jarojn kaj duonon.

La scienculoj de tiu fama angla universitato malakceptis la hipotezon ke oni malkovris la skeletojn de patrino kaj infano. La sepjara knabino estis entombigita post entombigo de la virino. Tion oni certigos nur post DNA-analizo, en kia parenceco estis la knabino kun la kvardekjaraĝa virino, en kies brakumo ŝi estis trovita.

En ilia proksimo oni malkovris pliajn du skeletojn de infanoj apartenantaj al Starĉeva kulturo.



La fakuloj de beograda Filozofia fakultato¹ konstatis ke unu el la infanoj

¹ La Filozofia Fakultato de Beograd-Universitato inkluzivas la fakojn Filozofio, Sociologio, Psikologio, Pedagogio kaj Adragio, Historio, Arthistorio, Arkeologio, Etnologio kaj Antropologio, kaj Klasikaj Studoj. — Red.Spiralaj galaksioj koliziantaj (foto de NASA)

mortis pro serioza malsano, meningito. “Krome oni trovis ostearon de homoj vivintaj ĝis profunda maljuneco — ĉirkaŭ 70 jaroj”-rimarkis D-ro arkeologo Sofija Stefanović.

Unu el la grandaj serbaj fakuloj pri antropologio en prahistorio emfazas ke tiu malkovro de dutomba tombo estas unu el plej valoraj malkovroj sur Balkana duoninsulo. “Raras la dutombaj tomboj el neolito”. La DNA-ekzamenoj farotas flanke de la germanaj fakuloj de Universitato Majnz. Ĉiukaze, ĉi funebro el prahistorio rakontas al ni ke tiuj homoj, la unuaj bredistoj kaj kulturistoj, havis grandskale altan gradon de emocioj, ĉar la knabino estis entombigita 40 jarojn post la ina entombigo, en kies brakumo ŝi estis malkovrita.

La scienculoj de la germana Universitato Johan Gutenberg konstatos firme “per kio la homoj el prahistorio nutris sin; ĉu ili estis malsanaj, de kio ili malsaniĝis kaj kial ili mortis” pli precize aldonis D-ro Stefanović.

Kion subkomprenigas la vorto- Starĉeva (serbe Starĉevačka) kulturo? —

Komence de la 20a jarcento en la vilaĝo Starĉevo, apud la urbeto Panĉevo oni malkovris, la unuan fojon en Serbio, la restaĵojn de prahistoria kolonio. Tial ĉiuj postaj malkovroj estis aldonitaj al “Starĉeva kulturo”. Laŭ la vortoj de arkeologo Mirjana Blagojević, en Mali Borko, krom skeletoj de prahistoriaj homoj estis malkovritaj pli ol cent diversspecaj objektoj. Oni malkovris kavojn kiuj servis kiel rubejoj, samkiel oni trovis kavojn el kiuj oni elfosadis krudaĵojn por elfarado de ceramikaĵoj kaj ujoj kaj figuretoj. Kolektitaj specimenoj de ĉi tiu loko ebligos al arkeologoj pli detalan bildon pri la vivmaniero de la prahistoria–neolita homo sur Balkana duoninsulo.



Spiralaj galaksioj [*foto de NASA*]

sento sveda

AŬTUNO

Kerstin Rhodin (Svedio, fine de septembro 2010)

Aŭtuno komenciĝas: Fino de septembro. Kelkaj tagoj belaj, varmaj. Mi povas sidi ekstere en la arbaro legante aŭ en parkoj en Stockholm. Ĝuste nun mi legas libron, kiu ficcie estas verkita de Lorenzo Da Ponte, kiu verkis libretojn por operoj de Mozart. Li rakontas pri sia vivo kaj pri sia kunlaboro kun Mozart. La stilo de la libro estas tre agrabla. Legante mi sentas min vizitanta la 18an jarcenton. Iun sunan tagon mi sidis kun mia libro apud la Reĝa Biblioteko (nacia biblioteko). La parko apud ĝi ricevis novan statuon de verkisto Hjalmar Söderberg. Li estis famulo en la sveda literaturo komence de la 20a jarcento. Li promenis tra Stockholm kaj “observis” kiel la verkistoj faris en tiu periodo. En la Reĝa Ĝardeno situas kafejo memore al li. Ĝi ludas gravan rolon en lia romano “Doktoro Glas”. En tiu loko situis akvotrinkejo kaj s-ro Glas miksis arsenikon en glason da akvo por la edzo de unu el liaj pacientoj, juna, bela edzino de maljuna pastro. Hjalmar Söderberg apartenis al la “observantoj” de la vivo, de la homoj, de sia urbo Stockholm, kiun li tre ŝatis. Mi nun bone komprenas tion, kiam mi promenas en la sama urbo. Mi loĝas jam de tri jaroj apud tiu urbo. Dum miaj ĉirkaŭvagoj mi ekkonis la urbon, ekŝatis ĝiajn akvosurfacojn kaj belajn domfacadojn. Mi trovis kelkajn ejojn, kie mi sidas kaj observas la vivon de la urbo aŭ ĝuas bongustan manĝaĵon. Vidas la rapidan kuradon de homamaso sur Hötorget (pajloplaco) en la centro de la urbo. Multe da fruktoj, legomoj kaj floroj aĉeteblas tie. La homoj rapidas al diversaj farenaĵoj aŭ se la suno iom videblas kaj varmigas la homoj ĝuas ĝin sur la ŝtuparo de la blufarbita Koncertejo, kie la 10an de decembro la Nobelpremio solene estas disdonata.

Mi kelkfoje sidas apud Strömmen (torento) apud la Parlamentejo kaj la Muzeo pri la Mezepoko en la urbo Stockholm, kiu tiam aspektis tute alie ol hodiaŭ. Sidi apud rapidfluanta akvo centre en la urbo dum krepuskiĝas varma, somera vespero estas ĝuo. Videblas ĉirkaŭ mi la Reĝa Palaco, la Parlamentejo, la Operejo kaj mia amata ruĝa Preĝejo de Jakob. Mi vizitis plurajn el la preĝejoj en Stockholm, kie oni tre ofte povas aŭskulti orgenkoncertojn senkoste — Bach, Beethoven, César Franck, Händel, k.a. Dum la aŭtuno okazis pluraj koncertoj sub la nomo “Vox pacis”. Tiam mi aŭskultis muzikon de sameoj (jojko¹), tibetanoj (blovinstrumento), hindoj (tamburoj), ankaŭ kantistoj — dancistoj el diversaj religiaj tradicioj. Mi sentis la mondon malfermatan alveni en mia urbon.

¹ Speco de improvizata kanto populara inter la sameoj.—Red.

En profundaj grotoj sub Skeppsholmen (la porŝipa insuleto) eblas ĉiaŭtune renkonti la argilajn soldatojn el Ĉinio tre bone ekspoziciitajn. Imagu promeni inter "artaĵoj" faritaj antaŭ 4000-5000 jaroj ĉe la alia flanko de nia globo! La tekstoj tre pedagogie instruas pri la malnova historio kaj vivo de la unua imperiestro de la imperio de Qin. Ekster la Orientazia Muzeo, kiu situas super la grotoj, la supervido al la Malnova Urbo kaj akvoj plenaj de boatoj brilas en la bela aŭtuna vetero.

En la apuda Nacia Muzeo post studo de pluraj ĉambregoj de Arto mi povas en la kafejo ĝui miraklan ĉokoladorton — preskaŭ same bongustan kiel tiu en la Rusa Muzeo en St. Peterburgo. Kun bona gvidisto mi ĉirkaŭpromenis en la Malnova Urbo en la kvartaloj de Bellman, nia granda verkisto kaj trubaduro en la 18-a jarcento. Tiam la plej multaj de la enloĝantoj de Stockholm loĝis en la Malnova Urbo, ĉirkaŭ 30 000. Ili trinkis dekoble da alkoholo (biero) ol nun. Akvo ne trinkeblis pro malpureco. La stratoj malbonodoris de malpuraj forĵetaĵoj. Kia diferenco dum pli-malpli ducent jaroj! Mi trovis malnovan restoracion de la 16a jarcento kun la nomo Magnus Ladulås, unu el la plej unuaj reĝoj de Sveda Regno.

Tie bongustis la en Svedio tipaj malgrandaj frititaj heringoj.

Kiam ankoraŭ la finsomera suno brilis mi vojaĝis per etaj boatoj al urbetoj en la arkipelago — urbetoj kun ruĝaj aŭ flavaj lignaj dometoj. Ĉe la maro plej ofte la dometoj estas flavaj aŭ eble blankaj. En la arbaro ili estas ruĝkoloraj. La vivo trankvilas en la etaj havenoj kaj en la apudmaraj urbetoj. Laŭdire la arkipelago inkluzive la urbon konsistas el 30 000 insuloj kaj insuletoj. Pluraj el ili estas rokoj kaj montetoj. Multaj havenoj kun ŝipoj kaj boatoj, kiuj iras al aliaj havenoj ĉe la Balta Maro; ĉefe al Finnlando kaj Estonio. De la alvenantaj ŝipoj vi povas vidi la Artan Ĝardenon "Millesgården" (la Ĝardeno de Milles), kie la statuoj etendiĝas al la ĉielo. Unu el la plej konataj estas "Mano de Dio", granda mano en kiu staras homo. Tiom da ĝuindaj, belaj lokoj inter akvo kaj rokoj troveblas en Stockholm. Mi nur tuŝis kelkajn lokojn, kiujn mi laste vizitis.

Per tiuj bildoj mi volas saluti vin de Stockholm kaj rakonti al vi iom pri miaj travivaĵoj dum la lastaj someraj tagoj. Mi ankaŭ estas tre dankema, ke mi povas kaj kapablas ĝui tiajn belajn tagojn, ke mi kapablas iri kaj vidi.



Restoracio Magnus Ladulås en Stockholm

rakonto

LA FORMO

de Istvan Ertl

La formo blanka ŝvelis supren, ĝis okulnivelo, momenton flosis ekvilibre, por majeste-moke forveli en la mallumon. Haraldo levis la rigardon, demetis sian tekkomputilon kaj ekstaris sur la balkono. La valon komplete kovradis nokto. Aliflanke de l'kontinento enŝaltis sin pre-regulitaj panrostiloj, ne muezino sed vibre luma radi-horloĝo ŝin vekis.

Haraldo elfingris cigaredon, igis sin videbla por fikciaj kaŝpafistoj sur la firsto fronte. Tiu montopinto partizanajn memorojn gardis. Silentis la vilaĝo, je la tria ne plu trapasis kamionoj toskanaj aŭ saksaj. Haraldo subpremis alergian tuson. La komputilo ombrumis la ekranon, ekvacioj malaperis en konvenan virtualon.

L'o blanka removiĝis, trenis sin sur la grundo, kiel la torditaj gazetfolioj kiujn li vidis ĉe la stacidomo, lasitaj post la elpelo de la senhejmuloj. Haraldo sin turnis, trairis la salonon, kie la DVD-ilo cikle reludis la filmon de hieraŭ, ŝtuparis al la kelo, la sola elirejo en la ĝardenon, kie ludiĝis la blanka pantomimo.

Ĉe la marbordo la vekhorloĝo nun mutis. Hanna palpis la subon de l'dekstra lipo, kie falto konkeris milimetron. Tra la fenestro ŝi vidis la jam vaporan varmon de la stratkruciĝo, vendopunkto de lokaj gazetoj en dudek lingvoj. Haraldo povus legi plejparton, sed lin alio interesas.

Oĉjo Schiltz repuŝis la kovrilon. Ŝvitgutoj rosumis lian stoplobarbon, bone servis la ĉiama akvoglaso sur la noktotableto. Talpoj, majskaraboj, lumbrikoj, oniskoj popolis lian sonĝon, lian ĝardenon.

Haraldo atingis la genu-altan mureton, kiu senpretende limis lian parcelon. La blankaĵo evidente transvelis ĉi tiun neobstaklon, kuŝis-flosis nun en najbara tereno. Lia duŝtuko ĝi estis, ribelinta kontraŭ la tukpinĉiloj. Makulo en la nigro, lun-splito vivonta ĝis aŭroro. Haraldo devis ĝin rehavi.

Kvindek kilometrojn pli sude, inter forŝutritaj vilaoj, sur rastita gruzo, kraketis la paŝoj de laca marŝantaro. Al nekonata celo, ekster la limojn de Schengen.¹

¹ Klarigo por ekstereŭropanoj: Schengen estas urbo kie definitive formiĝis la nukleo de Eŭropa Unio. Do Schengen-regiono = Eŭropa Unio.— Red.

arkeologio

LA METODO DE KONSTRUADO DE LA AL JIZAH- PIRAMIDOJ

NE PLU ESTAS MISTERO

de Henry Broadbent (Aŭstralio)

Ĉiu kiu serĉus laŭ la bretoj kontraŭ la muroj de nia domo trovus grupon de libroj kiuj koncernas la *piramidojn* de Egiptujo. Ĝuste nun mi legas la libron *Fingerprints of the Gods* de Graham Hancock kiu serĉas la “komencon kaj la finon”. Kiel mi li havas grandan scivolemon pri kial ni scias preskaŭ nenion el la historio de la homaro antaŭ 5 mil jaroj. Ja la indiĝenoj de Aŭstralio scias pli ol iu ajn pri eventoj de la pasinteco. En Viktorio ili rakontas pri la periodo kiam la golfo de Haveno Phillip estis kamparo super kiu ili ĉasis bestojn. Aliaj memoras la periodon kiam vulkanoj erupciis antaŭ 10 aŭ 20 mil jaroj.

Graham Hancock referencis en sia libro al la piramidoj de Meksiko, Peruo, kaj Egiptujo. Mi traserĉis miajn librojn kaj la reton por ke mi povu trovi la aferojn al kiuj li referencis.

Lastan jaron mi akiris libron verkitan de Joseph Davidovits. Li esploris dum pli ol 25 jaroj kaj finfine li pruvis ke kion li publikigis antaŭ multaj jaroj estas la vero. Nome ke la “ŝtonpiramidoj” en la nordo de Egiptujo ne estas konstruitaj el ĉizitaj ŝtonoj sed estas mulditaj brikoj de molaj kalkŝtonoj. La traboj kaj kovrofacoj estis mulditaj el pli malmolaj kalkŝtonoj kaj ili ŝajnas esti polurita kalkŝtono el Tura. Kontraŭe li pruvis ke ili estis faritaj, kiel betono, verŝitaj en skatolojn de krucplakaĵo, same kiel ni nun uzas por formi betonajn murojn k.t.p. Davidovits unue trovis ke delikataj potoj, vazoj kaj modeloj de kapoj evidente ĉizitaj el naturaj malmolaj ŝtonoj ankaŭ estas mulditaj. Li malkovris Egiptajn bildojn kiuj montras la teknikon. Tiuj bildoj antaŭe estis atribuitaj al alia metio.

Por inĝeniero la tre interesa informo estas ke la energio bezonita fari la aglomeritan miksaĵon estas nur dekono aŭ malpli ol ni bezonas por fari betonon. Davidovits nun uzas similan kemion por fari mulditajn varojn. Li loĝas en Francujo sed ankaŭ havas fabrikon en Perto en Okcidenta Aŭstralio. Li nun disvastigas siajn esplorojn kaj eldonis interesan informadon pri potoj en Italujo kaj *piramidoj* de Balkanoj.

Kiam mi informiĝis ke la kovrofacoj de la grandaj piramidoj de Al Jizah¹

¹ Al Jizah = Giza, loko de piramidoj, tre proksime al Kairo. — Red.

estis mulditaj, mi komprenis kial la individuaj blokoj sidas tiel apude ke oni ne povis meti la klingon de tranĉilo en la spacon inter ili. Mi ankaŭ deduktis ke la angulo de la granda piramido ne estas selektita por pruvi ke la Egiptanoj sciis la valoraĵon de π (3,14 au 22/7). Kontraŭe ili selektis proporcion por la flankoj de la muldiloj por ke la flanko de la *piramido* estu proksime 52grada kaj tiel facila por konstruado fare de la ĉarpentistoj. Ja la selekto de la proporcio 14/11 donas la ekvacion: perimetro de bazo $2 \times \text{alt} = 22/7$. Tamen mi opinias ke tiu rilato ne estis tre grava kompare kun la aliaj kialoj por konstrui la piramidon. La kialo por la generala uzo de *piramidoj* kun angulo de 52° estas pli profunda ol la bezono montri la proporcion de π aŭ Φ . Por kompreni tion oni devus studi la Pitagoran geometrion de sferoj. Tiu science traktas i.a. la rilatojn inter la proporcio de la ebena kaj la sfero. “1,618 estas al la ebena kiel 1,666 (60/36 gradoj) estas al la sfero”. Kompreneble tiu ankaŭ indikas ke la egiptaj sciencistoj komprenis sferan geometrion.

En ĉiu kazo simpla proporcio ekzistas doni angulojn kiuj diferencas per neatentinda kvanto disde la anguloj kiujn la termezuristoj trovis kiam ili mezuris la piramidojn. Multaj libroj kaj la reto donas la dimensiojn de la piramidoj ĉe Al Jizah. Tamen malgraŭ pluraj mezuroj fare de renomaj termezuristoj kiel W.M. Flinders Petrie and J.H. Cole la ciferoj ofte malkonsentas. En du kazoj la diferenco iom mistifikas min. Kial la ciferoj tro multe malakordas?

En la kazo de la dua piramido, de Ĥefren¹, la intencita alto 143,5 m) certe estas eraro. Pro la longeco de la bazo kaj la angulo, la alto devas esti 139,3 m. Fotoĝoj de la du grandaj *piramidoj* montras ke la pinto de Ĥefren estas akra kaj ne malakra kiel tiu de Ĥufu. La intencita alto de Ĥufu estis 146.6 m, sed nun ĝi estas 137 m; ĝi perdis 9,6 m. La intencita alto de Ĥefren estis 139,3 m, sed nun ĝi estas 136,4 m; ĝi perdis 2,9 m, ne 7,2m se oni uzas la kalkulon 143,6 m. Iu eraris kaj neniu kontrolis sed ripetis la eraron.

La alia signifa malkonsento estas la longeco de la bazo de la tria piramido de Menkaŭre. Ĉe unu loko mi trovis 105,5 m, kaj alia 108,5 m. Ĉu estas problemo por la futuro? La anguloj por la *piramidoj* kaj la proporciojn kiujn mi selektis por iliaj formoj estas:

Piramido	Mez. Angulo	Formo bazo	Formo dorso
Ĥufu	52,33° 11-unuo	14 unuo	51,84°
Ĥefreno	52,33° 17	22	52,31°
Menkaŭre	50,78° 9	11	50,71°

¹ La ortografio de la nomoj de la reĝoj egiptaj variegas. Ĥefren = Ĥafre = Khefra/Khefre/Khafra/Khafre. Ĥufu = Ĥeops. Men(e)kaŭre = Mikerino — Red.

Evidente la egiptoj ne estis malkleraj homoj sed havis teknikojn egalajn al aŭ eĉ pli bonajn ol ni ĝis la nuna epoko. Certe ili havis lensojn kaj uzis simplajn teodolitojn por konstrui la piramidojn. Dum 1975 κ E John A. R. Legon vizitis Egiptujon kaj informiĝis pri la komplika desegno de la areo ĉirkaŭ Al Jizah por kiu li devis uzi teodoliton kaj aliaj mezurilojn. Dum la jaro 2000 κ E Robert Temple eldonis sian libron *The Crystal Sun*. Liaj esploroj pruvis ke la egiptoj havis lensojn kaj la romanoj uzis teleskopojn.

Sendube ni ne longe bezonas dubi kiel ili konstruis la *piramidojn*. Mi opinias ke ili uzis teknikojn similajn al tiuj kiujn mi observis kiam mi vizitis Orientan Pakistanon (nun Bangladeŝo) dum 1964. Ili uzis lignan aŭ bambuan deklivon, korbojn por porti betonon, martelojn sen tenilo por frakasi rokojn, ŝovelilojn kaj pikpioĉojn por fosi la grundon, fajron por bruligi la kalkŝtonojn.

Davidovits pruvis ke la egiptoj fosis la molajn kalkŝtonojn apud la Sfinkso por fari la grandajn brikojn por la amaso de la piramidoj. Li trovis la minojn ĉe Dezerto Sinai kie ili minis la kemiaĵojn kiujn ili bezonis por katalizi la miksaĵon el kiu ili faris la brikojn kaj facojn. Eble ili frakasis la pli bonan Turan kalkŝtonon por fari la gruzon por la traboj kaj la kovrofacoj. Ili ne konstruis la grandajn deklivojn por tiri la 10-tunajn blokojn sed portis la gruzon kaj miksaĵon en korboj al la loko kien ili verŝis ĝin por fari la trabojn kaj kovrofacojn.

Mi sugestas ke la grandaj granitaj traboj super la “ĉambro de la reĝo” estis preparitaj je la komenco kaj ili estis lokitaj sur la tero en la centro de la bazo. Laboristoj tiam levis la trabojn iomete post iomete per la uzo de lignaj traboj kaj kojnoj; tiun metodon ni ankoraŭ uzas kiam argono ne estas havebla.

Por indiki kiel la Egiptaj ĉarpentistoj faris la formilojn kaj konstruis teodolitojn mi preparis skizojn. Ĝi ankaŭ indikas la uzon de la teodolito por helpi konstrui la klinitajn koridorojn kiuj havas 2/1 inklinon.

Ankaŭ inkluzivata estas skizo 1 por indiki la specialan karakteron de la granda piramido de Ĥufu. La konstruaĵo havas 8 flankon, ne kvar. La kialo por tiu sistemo estis uzi la piramidon kiel horloĝon. Ne nur la reflektado de la suda faco sed la ombro ĉe la norda flanko indikas la horon de la tago. Ankaŭ dum la ekvinoktoj la suda kaj la norda flankoj, kiam la facoj ekzistis, ekbrilis, unue unu flanko kaj rapide poste la alia flanko, je la sunleviĝo kaj sunsubiro kaj tiuj estis videblaj el grandaj distancoj. Aliaj personoj traktis la religiajn kialojn de la piramido de Ĥufu.


Ja, certe la moderna inĝeniero povus konstrui la piramidon sen grandaj problemoj per la uzo de la sama sistemo kiun la Egiptanoj uzis. Joseph Davidovits akirus multan monon per la vendo de la informado pri kiel fari

aglomeritajn ŝtonojn kaj la verdanoj aplaŭdus pri la ŝparado de energio. Mi prognozas ke baldaŭ la egiptoj rekonstruos la facojn de Ĥufu.




La granda piramido de Ĥufu, apud kies flankoj estas la piramidoj de liaj filoj Ĥafre kaj Menkaŭre, en Giza, Egipto. 26^a-25^a jc.AKE.


La granda piramido havas ok¹ flankojn:



¹ Jes, ne komposteraro. La aŭtoro atentigas ke foto 65 en *The Crystal Sun* de Robert Temple montras tion.—Red.




Antikva lenso el ĉ.700aK.E, en British Museum
(Bildo el Wikipedia: "Nimrod Lens".)




Skizo 2

JAK 16/02/2011



Simpla teodolito poziciita por deklivo de 2:1 (angulo de $25,56^\circ$) (aŭ supre aŭ malsupre)



Simpla teodolito aranĝita por kontroli la deklivon de flankoj de piramido

Iu ajn ĉarpentisto povus fari tiun teodoliton

rakonto

ETA ŜTELISTO

Mara Vučelić (Montenegro)

(La rakonton elektis el la rakontaro PILATOVICI kaj tradukis Bojana Alfirević)

Frue, antaŭ sunleviĝo, Maksim kaj Radovan venis konstrui la kabanon por somerrestado en la montaro Volujak. Ĉio pretis por la konstruado: la porfundamenta foso, ŝtonoj, cemento, bretoj kaj ilaro. La fonto estis proksime, ĉirkaŭ kvin metrojn de la konstruloko.

Ĉi-foje ili kunportis la manĝaĵon, cigaredojn kaj trinkaĵon. La ladajn bierujetojn ili plonĝigis en la fonton, por ke ili malvarmiĝu kaj la biero plaĉe sensoifigu la laculon.

Ankaŭ Stevo jam pretkonstruis sian kabanon ie proksime. De tie etendiĝis laodoro de la freŝa mortero kaj abiaj bretoj. Kun gumaj botoj surpiede, Stevo tretis en la densan altan montaran herbon. Li vokis de sia kabano:

“Ĉu vi alvenis?”

Maksim respondis hezite:

“Jes, jes. Venu ĉi tien...”

Stevo alvenis kaj laŭdis lian laboron, atente ĉirkaŭrigardis la kabanfundamenton kaj tutsincere kuraĝigis ilin:

“Bele, bele... vi rapidigu la konstruadon por ke la dommastrinoj povu ordigi sian laboron”.

Maksim regalis Stevon per lada ujeto da malvarma biero, kaj Radovanon per cigaredo. Radovan metis la alian, ankoraŭ ne malfermitan cigaredskatoleton sur iun ŝtonon.

La triopo sidis parolante pri tio, kiom da kio oni aĉetis por konstrui la kabanojn.

“Reprenu novan cigaredon!” — diris Radovan al la najbaro.

“Dankon, volontе. Mi ja ne havas cigaredojn. Mi ekfumu plian, dum vi rekomencos labori. Mi foriros tre baldaŭ, ĉar devas aĉeti ion en la urbo. Mi revenos morgaŭ vespere”.

Stevo restis side ĝuste por fintrinki la bieron kaj poste adiaŭis ilin:

“Ĝis morgaŭ vespere, najbaroj !”

“Ni revidiĝu!” unuvoĉe respondis Maksim kaj Radovan.

Kiam Maksim kaj Radovan paŭzis de la laboro, ili trinkis malvarman bieron malrapide kaj frande. Radovan rimarkis ke la cigaredoj ne plu estas sur la ŝtono. Li demandis Maksimon:

“Ĉu vi prenis la cigaredojn de sur la ŝtono?”

“Ne!” respondis Maksim.

“Ili ne estas tie ...” diris Radovan.

“Kiel ne estas?” koleris Maksim.

“Ili estas for... Mi estas nek freneza, nek blinda” diris Radovan malbonhumore.

“Ĉu la najbaro ŝtelis la cigaredojn? Ĉu eblas?” brovkuntire eldiris Maksim kun maldolĉa sento.

“Certe. Kien ili povus malaperi?!” konfirme respondis Radovan.

“Vi aŭdis lian diron ke li restis sencigarede?”

“Li diris tion” respondis Radovan.

“Estus ja pli honeste peti pri donaco ol kaŝe enpoŝigi ilin” grumblis Maksim.

“Fi ! Li hontu. Sed pri tio ni parolos al neniu. Ĉi tio estas hontaĵo. Neniu eĉ kredos,” diris Radovan kun indignita kapskuo.

La afero elĉerpiĝis, ĉu li ŝtelis, ĉu li ne ŝtelis...

Ĉirkaŭ tagmezo ili denove paŭzis, tagmanĝis kaj refreŝiĝis per biero. Maksim diris: “Ni iru, Radovan kaj trarigardu la kabanon de la najbaro Stevo”.

Radovan konsentis kaj postiris Maksimon, kiu ekretis tra la dense staranta herbaro estigante padon. Li subite surpaŝis freŝan bestan fekon kaj lia piedo forglitetis. Tutproksime Maksim trovis la ruĝan cigaredskatoleton. Li kliniĝis kaj levis ĝin:

“Rigardu Radovan, jen viaj cigaredoj. La skatoleto estis tute dismordita kaj trapikita. La najbaro havas hundeton, kiun ni ne vidis antaŭe”.

La eta petolemulo finis sian ludon per la cigaredskatoleto kaj lasis ĝin ĉe la osto, en la herbo. Ĝi estis ludonta tuj kiam ĝia mastro alvenos. Proksime Radovan trovis bildokarton kun kapo de blanka malta hundo kun ĉarma rigardo. La bildokarto estis ĉifita.

“Jen Stevo skribas al la patro, ke bezonas monon por aĉeti cigaredojn... Ni donu ĝin al Stevo...” ridante platis la bildkarton Radovan.

Maksim staris, atente okulumis la skatoleton de ĉiu flanko kaj kun animsenpeziĝo diris:

“Jen Radovan, se ni ne venus ĉi tien, mi restus konvikinta ke la eta ŝtelisto estas Stevo. Dio instigis nin veni surloken. Kaj dank'al Dio, ni rakontis la okazaĵon al neniu ajn...”.

“La vorto mem — ŝtelisto — sonas ja malbene! Tiom malbela kaj bruta. Ĝi humiligas...” respondis Radovan kaj ekfajrigis la cigaredon.

poezio
ARTISTOJ INTER SI
de Anneke Schouten-Buys

Mi promenetis iom kun Dio — li bedaŭris
la foreston de Ĥanoĥ: tiu viro povis
promeni tiel foren sen laciĝo.¹
Li montris al mi movantajn pentraĵojn
el nuboj, ĉielo kaj ventoj; mi havis nur
mobilfigurojn pendantajn de fadenoj sed
Li ŝatis la ideon kaj demandis ĉu
mi ion verkis lastatempe. “Kaj Vi?”
demandis mi. “Ekde la Psalmoj kaj
Alta Kanto iom ĝenas Min verkista bloko”
konfesis Li. Mi konsole frapetis
Lian ŝultron: “tia silento
Kutime daŭras nur kelkajn tagojn.”
“Jes,” Li diris “sed Miaj tagoj
ĉiuj daŭras pli-malpli mil jarojn.”
Silentaj ni rigardis aron da
Ludantaj delfenoj. “Kuraĝon! mi diris,
Via lasta kolekto ankoraŭ furoras
Do la publiko ne forgesas Vin.”

¹ En la biblio, Genezo 5:18 “Kaj Ĥanoĥ iradis kun Dio” — red.

geografio

RESUMO DE LA ESPLORADO RILATE AL AŬSTRALIO

de Terry Manley (Aŭstralio)

“Tamen ĉi tiuj maristoj (Hispanoj) estis la unuaj atingi teron preter Sud-ameriko kaj ili konfirmis la kredon ke ekzistas Suda Lando.”¹ Iom troa skribaĵo se oni komparas kontraŭ “Je 1200AKE ili [la Lapita popolo de suda Pacifiko] koloniigis la Fiĝiojn, Samoojn, Tongon kaj aliajn insulojn, irante pli ol 5000 km en siaj boatoj. Ili estas popolo de 800 000 kun similaj lingvo kaj deveno loĝante areon pli grandan ol iu ajn alia popolo.”² Ĉi tiu popolo kaj ties praidoj, la Polinezianoj, iris pli kaj pli orienten enloĝante insulojn Havajan, Paskan kaj multajn aliajn inkluzive de Nov-Zelando. Laŭ Gordon McLauchlan “ili preskaŭ certe esploris pli orienten ĝis Sud-Ameriko. ... Ili ankaŭ surteriĝis sur la marbordo de Aŭstralio sed renkontis fremdan medion kun loĝantoj delonge establitaĵ.”

Ekde proksimume 1100KE (aliaj libroj rekomendas la jarcenton 1500KE) estas spuro montranta ke Makasar-fiŝkaptistoj (el nuntempa Sulawesi-Indonezio) venis al la nordaj partoj de Aŭstralio por interŝanĝi aĵojn kun la Aŭstraliaj indiĝenoj. Ili venis kaj restis dum la “malseka” sezono (decembro-majo) kaj kolektis tripangon (marlimakon) por komerci kun Ĉinoj, kiuj ŝatis ĝin kiel frandaĵon. Ili ankaŭ komercis pri Santalligno kaj testudŝelo (aŭ heloniŝelo).³

Ĉinaj maristoj vojaĝis al la orienta marbordo de Afriko ekde 860KE. Ili esploris la Indonezian insularon. Ili poste komercis kun la Makasar-fiŝistoj por akiri tripangon. Kiam Marco Polo revenis de Ĉinio en 1271KE li iris per ŝipo preter Malajzio kaj Sumatro. Li priskribis sudan landon proksimume 300km sude de Javo; “Tie troviĝas multe de oro, multegaj blankaj konketoj de la maro. Al ĉi tiu lando venas malmultaj fremduloj, ĉar ĝi estas tiel malproksima.” Post la vojaĝo de Vasco da Gama en 1497 la Portugaloj komencis komerci en orienta Afriko, Hindujo, kaj nuntempa Indonezio. Ili komercis pri spicoj, manĝaĵo kaj valoraj metaloj. Dum ĉirkaŭ cent jaroj ili estis la fonto de tiuj ekzotikaĵoj en Eŭropo. Pro la traktato de Tordesillas (1494) la Portugaloj gajnis rajton al tiu regiono kontraŭ la Hispanoj. Laŭ la traktato (kaj Papo) la Hispanoj gajnis la “Amerikojn” sed devas resti en la Okcidento, lasante la Orienton al la

¹ *Australia, Australia! The Pioneer Years*, R. M. Younger 1975

² *A Short History of New Zealand*, Gordon McLachlan

³ “The Exploration of Australia”, *Readers Digest*

Portugaloj. Ke la Portugaloj esploris sude de Indonezio, dum la deksesa jarcento, estas konjekto. Ĉu ili sciis pri la komerco de la Sulawesianoj de tiu tempo? En 1516 la Portugaloj estis en Timoro; Oni rakontas pri mapoj perditaj en tertremo ĉe Lisbon je 1755¹. Estas rakonto, ke Portugala ŝiparo de tri ŝipoj (karaveloj) gvidate de Kapitano Cristavao de Mendonca esploris la marbordon de Aŭstralio ĉ. 1520, sed nenia registro de tiu vojaĝo postvivis. En 1836 apud Warnambool en Viktorio ŝipvrako estis trovita en la sablo. Estis konjekto ke la ŝipo povis esti de Portugala deveno. La ligno estis ruĝa mahagono do la ligno kaj konstruo nekutimaj laŭ Brita scio. En 1890 ĝi malaperis sub la sablo.

La alia atesto, laŭ iuj inkluzve de George Collingridge, pri la esploro de Aŭstralio fare de la Portugaloj estas la “Dieppe”-mapoj. Kvankam oni notas, ke la mapoj ne estas precizaj laŭ longitudo, oni ankaŭ rimarkas, ke “Kaj ĉar ĉiu maristo de tiu periodo (ĉ. 1600 kaj pli frue) havis problemon pri la kalkulo de longitudo”², estas kompreneble, ke la mapoj ne tiel precizas.

“Samtempe (fino de la deksesa jarcento) notinda eksperimentado okazis en kartografio. Ĉe la franca haveno Dieppe, kartografoj imagis riĉan landon sude de Javo kaj post nelonge tiel nomata ‘Javo la Granda’ komencis aperi sur mondaj kaj regionaj mapoj. Iuj opinias ke la Dieppe-mapoj provizas aludojn al Portugala esplorado de la marbordo de Aŭstralio en la 1520aj jaroj sed neniaj dokumentoj pri tiuj vizitoj ekzistas. Multaj versioj de la imagita Suda Lando estis designataj kaj por multaj jaroj kunekzistis kun registrita scio.”³

La literatura verko de Thomas Moore *Utopia* publikiĝis en 1516 kaj en ĝi estis “Granda Suda Lando”. Ankaŭ la *New Voyage Round the World* de William Dampie (1697), la romano *Robinson Crusoe* de Daniel Defoe (1719), kaj *Gulliver’s Travels* de Jonathan Swift (1726) aperis kun rakontoj lokitaj en la Suda Pacifiko. Do jam estis konjektoj pri insuloj kaj landoj en tiu regiono.

Kvankam la Hispanoj ne rajtis iri orienten, iuj el ili decidis, ke estas eble trafi la “Orienton” se oni iras sufiĉe okcidenten, preter Sud-Ameriko kaj trans Pacifikon. Do dum la deksesa jarcento la Hispanoj esploris la Pacifikon. Ferdinand Magellan por Hispanujo (kvankam li estis Portugalulo) ĉirkaŭiris la sudan parton de Sud-Ameriko per velŝipo (1520). La Guberniestro de Peruo elsendis du ŝipojn sub la estrado de Álvaro de Mendaña en 1567, “velŝipi sur nekonatajn marojn, kie neniu aventuris velŝipe antaŭe, por eltrovi novajn landojn kaj novajn popolojn.”⁴ (Ĉu vere? Refoje kio pri la Polinezianaj maristoj?) Li alvenis al Salomon-Insularo en Januaro/Februaro 1568. Mendaña

¹ *Australia*, John H. Chambers 1999

² *A Short History of New Zealand*, Gordon McLachlan

³ *Australia in Maps*, National Library of Australia

⁴ *The Story of the Solomons* Charles E. Fox.1975

provis retrovi la Insularon post 30 jaroj sed li anstataŭe trovis la Insulon Santa Cruz.

Quiros, Hispano, heredis la revojn de Mendaña kaj iris en 1606 al Nov-Hebridoj nomante ĝin “Australia Espiritu Santo”, la Nova Jerusalemo. Poste li forlasis S-ron Torres ĉe “Australia Espiritu Santo” (neniu plu vidis Quirosen) Torres cirkaŭiris la insulon por sciigi ke ĝi estas tia kaj iris okcidenten kaj fine tra la markolon de Torres inter Aŭstralio kaj Nov-Gvineo. Li vidis insulojn, sed ĉu parton de Kabo Jork, oni ne scias. Li alvenis monatojn post la esploro de Willem Janz.

La ĝenerale akceptita surteriĝo de Eŭropano sur Aŭstralian teron estis je 1606 de Willem Janz, Nederlandano, kiu esploris Kabon Jork kaj la Golfon de Karpentario. En 1595 la Nederlandanoj alvenis al la insuloj kaj komencis anstataŭigi la Portugalojn perforte. En 1602 ili sukcesis en ĉiu loko escepte de en Timoro. Kaj naskiĝis Nederlanda Orient-Hinda Kompanio. Janz faris sian esploradon de la norda parto de Aŭstralio en 1606. En 1616 Dirk Hartog surteriĝis sur la okcidenta marbordo de Aŭstralio. Sekvis aliaj Nederlandanoj sur tiu marbordo ĉar ili komencis laŭiri ŝipvojon orienten de la Kabo de Bona Espero, Sud-Afriko, uzante la avantaĝon de la “40aj ventegoj” (ventoj el la okcidento ĉe latitudo 40 gradoj suden.)

En 1644 van Dieman komisiis Abel Tasmanon esplori sude de Indonezio por la Nederlandanoj. Tasman iris suden kaj laŭiris la okcidentan kaj sudan marbordojn de Aŭstralio venante al Tasmanio (antaŭe nomita Lando de van Dieman). De Tasmanio li iris al Nov-Zelando kaj fine preter Nov-Gvineo reirante al Indonezio. Ĉu la unua cirkaŭiri Aŭstralion, kvankam ne laŭ la orienta marbordo?

Do la deksepa jarcento estis la jarcento de Nederlanda esplorado de la suda maro kaj “Granda Suda Lando”. Sekvis en la dekoka jarcento la vojaĝoj de la Francaj kaj Britaj maristoj: Bouganville, la Peruse, Cook; kaj la pli preciza mapado de la “Granda Suda Lando”, Nov-Zelando kaj iuj el la pacifikaj insuloj. Cook kaj liaj samtempuloj havis la avantaĝon de precizaj horloĝoj kaj instrumentoj por scii longitudon kaj tiel scii kie ili precize estas.

Ĉu nacioj kaŝis sian scion de la konata mondo por protekti siajn koloniojn aŭ la estontecan eblecon fondi kolonion? Kaj tial ne estis ĝenerala diskoniĝo de la dokumentoj pruvantaj la malkovron de landoj pli frue faritan de aliaj? La Polinezianoj ne havis skribitan historion do ni ne scias de tia fonto ties esploradon. Nur per prarakontoj kaj arkeologoj ni povas lerni. Ĉu la Portugaloj, kiuj ja havis skribitan historion, kaŝis sian konon de la sudo? Ĉu la Nederlandanoj detruis tiun historion por gajni la honoron esti la unuaj esploristoj de la sudo?

Ĉu la diskuto aŭ disputo pri kiuj estas la unuaj Eŭropanoj en Aŭstralio

meritas multe da energio kaj tempo kiam oni konsideras ke la Polinezianoj, Indonezianoj, kaj Ĉinoj plejble jam vizitis Aŭstralion?



La orienta bordo de La Granda Javo: el la atlaso de Nicholas Vallard, 1547. Ĝi estas parto de kopio el 1856 de unu el la Dieppe-Mapoj. La ekzempleron tenas la Nacia Biblioteko de Aŭstralio.

Humuraĵo

de Siv Burell (Svedio)

1. “Petro, ĉu vi povas nomi urbon en Italio?”
“Volonte, instruistino, sed kiun?”
2. “Petro, kiom da militoj Karlo la XIIa faris?”
“Kvin.”
“Bv. laŭvice nomi ilin!”
“1, 2, 3, 4, 5.”
3. “Ĉefkelnero! Ĉi tiu manĝo estas malvarma, odoras malbone, aspektas naŭza kaj brulgustas.”
“Ion ajn pli?”
“Jes, la porcioj estas tro malgrandaj.”
4. “Ĉu vi pensas ke la televido povos anstatŭi la gazetojn?”
“Neniam. Kiel oni povus ĉasi muŝojn per televido?”

recenzo

Nomoj kaj sortoj

de Julia 'Sigmund

recenzas Donald Broadribb

Nomoj kaj sortoj de Júlia Sigmund. 110 paĝoj, broŝuritaĵ. Eld. Exit (Cluj, Rumanio), 2011.



Júlia Sigmund prezentas al ni tre modestaspektan, tamen bele presitan verkon kiu vere indas nian atenton. Temas pri 12 rakontetoj, ĉiu estas dediĉita al unu persono — La aŭtoro diras ke plejparte temas pri veraj personoj. Ĉiu rakonto plaĉmaniere priskribas eventon en la vivo de la koncerna persono. La eventoj multe varias: jen ni legas pri fama dirigente, kies kapablo kaj scio pri muziko estas rimarkinde feblaj. Orkestroj sukcesas ludi malgraŭ li, ne helpe de li. — Jen ni legas pri virino kiu nek scias legi nek skribi. Amikino ŝia skribas laŭ ŝia dikto letero, kaj respondo alvenas, la sola letero kiun tiu virino ricevis dum sia tuta vivo! — Jen ni legas pri korespondado inter virino kaj manlaboristo. La manlaboristo sopiras studi

pentrararton. Subite la korespondado ĉesas. Pri la kialo, vi mem legu la rakonton!

La stilo en ĉi tiu libro estas leĝera, klara, kaj rekta. Ĝi havas sonon familieran, kiu plaĉas ne nur al la orelo sed samtempe al la okulo. La aŭtoro jam de multaj jaroj verkas tiajn ĉiutagecajn-sed-samtempe-trafajn rimarkigojn pri la vivo de ial atentindaj “ordinaruloj”. Ŝiaj rakontoj grandparte aperis en la rumana gazeto kiun ŝi redaktis, *Bazaro*. Aliaj libroj ŝiaj inkluzivas *Mi ne estas Mona Lisa* (2001) kaj redakto de la libro *Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo* (2008), kiuj konsistis el tiutitolaj artikoloj diversaŭtoroj, aperintaj en *Bazaro*.



En la magazino *Monato* ankaŭ aperis pluraj ŝiaj verkoj: “La reala historio de donacbovino” en 1999, “Sep citronŝeloj” (2006), “La mistera nokto” (2009, kaj “La malĵaluzo de Klorinda” (kun ŝia edzo, Sen Rodin; 2010).

La Mirmekobo



Kiel besto, la Mirmekobo (*Myrmecobius fasciatus*) estas preskaŭ elmortinta en sia indiĝena aŭstralia teritorio. Sed en sia revua formo, ĝi estas internacie havebla senpage, kaj ni esperas ke vi enhejmigos ĝin, nutros ĝin per viaj legado kaj kontribuo de enhavo, kaj ĝuados ĝin. Adreso por ĉiuj komunikaĵoj, por peti ekzempleron aŭ por peti abonon, kaj por sendi kontribuajon:

mirmekobo@mac.com

Abono al la revuo estas senpaga. Ĉar neniu surpapere presitaj ekzempleroj ekzistas, neniu preskosto ekzistas. Se vi deziras mem per via komputila presilo presi ekzemplero(j)n, por vi mem aŭ por aliaj, tion vi rajtas fari laŭdezire kaj senpage.

La revueto Mirmekobo estas sendependa, kaj subtenas neniun ismon. Artikolojn povas kontribui iu ajn. Tre bonvenaj estas literaturaĵoj: noveloj, poemoj, prozaĵoj iaspecaj; esprimoj de vidpunkto; historiaĵoj; prezento de interesaj hobiaj; biografiaĵoj, aŭtobiografiaĵoj; legendoj, mitoj... Bildoj, ĉu fotoj, ĉu desegnaĵoj, ĉu klarigaj, tre bonvenos. Reklamojn, anonc(et)ojn, propagandon, lingvajn studojn aŭ kritikojn, pornaĵojn, Mirmekobo malakceptas. La redaktoro rajtas akcepti, modifi, aŭ malakcepti ian kontribuajon, kiun li opinias malkonforma al la karaktero kaj reputacio de la revueto. Korektojn evidente bezonajn li rajtas fari, konsultinte la verkinton.

© kopirajto apartenas al la verkinto de kontribuajo.

Represo de kontribuajo(j) estas permesata.

Malnovaj numeroj de *Mirmekobo* troviĝas ĉe www.gazetejo.org/mirmekobo kaj ankaŭ ĉe la retejo de la redakcio:

<http://web.me.com/donbroadribb1/>

Redaktoro: Donald Broadribb